

Bô Yin Râ

VORTOJ DE VIVO

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG
BERN

La civitana nomo de Bô Yin Râ estis
Joseph Anton Schneiderfranken

Dua eldono
La unua eldono aperis en 1923

La libro "Vortoj de Vivo" estas unika en la instrua verkaro de Bô Yin Râ,
estante "solenaj vortoj de Dio, estiel la eterna *vivo*, direktitaj al la individua animo,
kiu fine respondas feliĉoplene per solena promeso“.

El la Germana originalo
(„Worte des Lebens“, eldono de 1959)
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

ALVOKO

Vi ekiris por serĉi *min*, kaj plende vi demandas, kie oni trovas min! –

Sed *mi* demandas vin, kial vi ĝis la hodiaŭa tago ne min *trovis*? –

Jen mi donis al vi mian *vidadon* kaj mian *aŭdadon*, kaj mia *parolo* estas en via buŝo!

Kial vi mutiĝas antaŭ mi, kiam mi postulas de vi respondon, dum vi ja povas paroli, kiam nur *silentado* povus alporti al vi malkaŝon? – –

Vi parolas malplenajn vortojn antaŭ surdaj oreloj kaj estas ebriigita de la trompa ekkonado per viaj sensoj, tiel ke *mia* parolo aperas al vi *fremda*, kaj *mal-luma* mia *vorto*.

Tamen vi iam devos formi al mi *respondon* en mia *parolo*, kiun mi donis al via buŝo, kiam mi ellasis vin el mi ...

Vi ankoraŭ volas *kaŝi* vin antaŭ mi per artoriĉa parolado, sed sciu, ke mi estas proksima al vi kiel la lumo al la lumilo, kaj ke vi neniam povas kaŝi vin for de mi, kvankam via okulo ne vidas min tiom longe, dum vi lasas vin blindigi de via propra malsaĝeco! –

Kion alian mi volas ke vi faru, ol ke vi min *trovu*? Kaj vere: *facile* mi lasas trovi min! – – –

Mi scias, ke vi serĉas *min*, eĉ se vi iradas sur eraraj vojoj kaj pretekstas, ke vi serĉas *ion alian* ...

Serĉas min la *malsaĝulo* kaj la *saĝulo*, kaj la serĉado de l' malsaĝulo estas malsaĝa nur tial, ke li mem *malfaciligas* al si la vojon al mi, dum la saĝulo ne konas alian klopodon ol *faciligi* al si la vojon. — —

Ĉiun ŝarĝon li ĵetas for de si, veston kaj migradan bastonon, por ke li min atingu *nuda*, kiel la ventro de lia patrino naskis lin ...

Sed vi ornamas vin per brokitaj vestoj, surmetas perljuvelojn kaj oraĵojn, kaj ligas pezajn, orajn sandalojn ĉirkaŭ viajn piedojn. —

Tiam vi longe kaj profunde pensadas kaj explore serĉas la plej longan vojon, ĉar nur la *plej longa* vojo ŝajnas al vi *ĝusta* por atingi *min*.

Premita de ĉio, kio povas nur ŝarĝi vin, vi migradas senfinajn distancojn, kaj tiam kuŝas laciĝinte, ĝis via alta *kuraĝo* turniĝas en *malesperon*. — — —

Tiumaniere vi *neniam* trovos min!

Vi strebas al la *foreco*, dum mi estas *pli proksima* al vi ol *via propra korpo*, kiun vi celas konduki renkonte al mi kun ŝarĝo da ornamaĵo, sed mi vere ne povas atenti vian ornamaĵon, kaj la trompaĵo de viaj vestoj nur *kaŝas* min al vi! — —

Ĉesigu ĉiun pruntitan parolon, por ke *mia* parolo estu en via buŝo!

Restu tie, kie vi hodiaŭ troviĝas, kaj deĵetu de vi ĉiun ŝarĝon!

Nuda kaj sen juvelaro eniru en vian *plej internan internon*, kaj lernu *silenti*, ĝis mia parolo revenas al vi por sciigi vin pri *mi*!

Mi *amis* vin en mi mem, ĉar vi estis ĉe *mi* de eterne, kaj mi *amas* vin, kvankam vi min *forlasis*!

Estas ne *mi*, kiu sin kaŝas antaŭ vi, sed *vi mem* provas kaŝi vin antaŭ mi!

Vi direktas vian rigardon en la *malplenon*, kredante, ke vi eble trovos min tie, sed vi bezonus nur turni vin al *vi mem* por esti *ĉe mi*! — — —

Vi ankoraŭ ne *scias*, ke vi kaŝas vin antaŭ *mi*, kiam vi provas kaŝi vin antaŭ *vi mem* en pezaj pompaj vestoj, por proksimiĝi al mi!

Vi ne *scias*, ke *mi mem* donis min al vi kaj ke vi trovas nur en *vi mem* ĉion, kion vi ankoraŭ serĉas ekstere!

Jen la trezoroj de ĉiuj mondoj estas kiel *polvo* kompare kun la *juvelo*, kiun vi havas *en vi mem*! — — —

MI

En ĉiuj atomoj de via korpo lumas *Mi!*

Tiu ĉi korpo el firma kaj duonfirma substancoj estas al mi kvazaŭ alabastra lampo, en kiu *mi*, la *lumo*, ĉion tralumas. — —

Ĝi ne *tenas* min!

Nenio povas min teni!

Ĉio ekster *mi* estas al mi *bildo*, kaj *mi* estas *lumo* al ĉiu bilda formaĵo, kiun *mi* tralumas! — —

Mi estas fluideca forto kaj tamen *super* ĉiuj fluidecaj fortoj! — —

Mi *sonas* en ĉiuj liutoj, harpoj kaj flutoj de la senfina spaco! —

Mi estas majstro de senfinaj *simfonioj*, de kiuj resonas la sferoj de la eterneco!

Kiu volas ekkoni *min* kaj eterne vivi en *mi* el la forto de la *lumo*, tiu devas fariĝi unu el miaj *instrumentoj* ...

En la *lumanta tono* de unu el miaj simfonioj li devas soni al eternaj sferoj. — —

Mi *ligas* la sonojn kaj *malligas* ilin laŭ mia propra leĝo, imanenta en mi de eterne.

Estante majstro de miaj simfonioj, mi havas sub mi bonajn muzikantojn.

Ili ĉiuj obeas al mia signo, kaj neniuj el ili iam eligos *malĝustan* tonon el miaj instrumentoj ...

Mi mem faras nur la *signojn*.

Miaj muzikantoj tiam sonigas la instrumentojn, kaj jen *mi* estas la tono eliĝanta el ili. — — —

Kelkaj el la instrumentoj *konsciiĝas* — sed aliaj *ne* — pri tio, ke ili eksonas nur kondukate de mia *leĝo*, kaj ke *mi* estas la tono, kiu sonas en ili. —

Tiu ĉi *kadavro*, kiun vi vidas, kiam vi rigardas vin de ekstere, certe ne estas *Mi!* — — —

Sed en ĝi mi donis al mia forto *punkton de apogo*, por ke mi povu sonigi ĉion sur tiu ĉi tero kaj naski min *mem* en ĉio kiel *sonon* ...

Nedireble granda estas la nombro de simfonioj, kiuj estas kaŝitaj en mi kaj volas sin malkaŝi. — —

En ĉio, kio *volas* eksoni per mi, mi volas formi min en *luman sonon!*

Ankaŭ *vin* miaj muzikantoj ne forgesos, se vi *volas* fariĝi unu el miaj instrumentoj. —

Ankaŭ *vi* eterne lumante sonu en unu el miaj senfinaj simfonioj!

Estas *mi*, kiu povas liberigi vin, ĉar nur kiam *mi mem* eksonas en vi, vi estos *eterne beatigita!* — — —

Vidu: via tuta sopiro volas nenion alian ol *unuigi* vin kun mi en lumanta sonado!

Vi *sentas* la sopiron de via koro, sed vi ankoraŭ ne scias interpreti ĝin. —

Latente, kiel en netuŝita kordo, kuŝas en vi *via propra sono*; sed nur se vi volas unuigi vin kun *mi*, vi povos eksonigi *vin mem*. –

Nova sono tiam eksonos en la *kosmo*, kaj vi aŭdos *vin* en alta potenco – estante unuigita kun mi – en *via propra*

Mi! – – –

ENIRO EN SIN MEM

Vi devas lerni aŭdi vin *mem*, se vi volas iam esti *aŭdata*.

Vi ankoraŭ aŭskultas al diversaj voĉoj kaj donas jen al tiu, jen al tiu ĉi la nomon de vi mem ...

Sciu, ke vi estas *io alia* ol ĉiuj voĉoj de la mondoj *videbla* kaj *nevidebla* ĉirkaŭ vi!

Vi ankoraŭ rigardas *tion alprenitan*, kion vi iam devos forlasi, kiel *ion esence propran*, tiel ke ĝi devas kaŝi al vi *vin mem*.

Vi ankoraŭ aŭskultas al laŭta vokado *ĉirkaŭ vi*, tiel ke vi ne plu povas *kompreni vian propran parolon!*

Vi ankoraŭ serĉas ankaŭ *min* en tiu laŭta vokado, kiu de ĉiu flanko bruas en viaj oreloj, kaj vi provas, streĉe aŭskultante, aŭdi *mian* voĉon en tiu bruado.

Sed *min* vi povas aŭdi nur *en vi mem*, kaj nur post kiam vi sukcesis aŭdi *vin mem!* – –

Ne *apud* vi, sed *en vi mem* mi estas en vi kaŝita! –

Tial ne serĉu min kiel ion alian *ekster* vi, se vi vere volas trovi min!

Tio estus granda *malsaĝaĵo* kaj farus vin predo de la *fantomoj*, kiujn vi *mem* kreas al vi, se vi adore klinas vin antaŭ potenco, kiu ne estas trovebla *sole en vi mem!*

Jen mi estas en ĉiuj universaj spacoj, kaj se *vi* estus kiel *mi* en ĉiuj universaj spacoj, vi trovus min ankaŭ *tie* ...

Sed vi estas nur en *via* kosma loko! – –

Neniu alia povas esti *ĉe si mem* tie, kie *vi sola* en la nemezurebla kosmo estas *ĉe vi mem!* –

Sed nur tie, kie vi estas *ĉe vi mem*, vi povas aŭdi *vin*, kaj nur tiam, kiam vi aŭdas *vin*, mi povas malkaŝi *min* al vi. – – –

Malfacile estos al vi ekkoni *min*, se vi ankoraŭ ne ekkonis *vin mem!* –

Eble ŝajnas al vi, ke mi ne povus resti al vi *distin-gebla* de vi mem, se vi perceptus min *en* vi ...

Vi troe kutimiĝis percepti ion nur *apud* vi, ol ke vi ankoraŭ povus senti, kion signifas: ekkoni ion *en* via propra „*mi*“. – –

Vere, vi malproksimiĝis foren de *vi!*

Vi ankoraŭ *diras*: „*Mi*“, sed tio, kio sin nomas tiel, havas *nenion komunan* kun *vi mem*.

Jen ĝi estas via *korpo* kaj ties impulsoj, – jen ĝi estas io tera *nevidebla* en vi, kio sin nomas per tiu vorto, dum vi mem *rezignas* „*eksterigi*“ vin ...

Sed en *tio ekstera* vi *devas* lerni teni *vian* pozicion, se tio ekstera ne fariĝu por vi *kateno!*

Vi mem ligu ĉion eksteran ĉirkaŭ vi per la fortikaj ŝnuroj de via *volo*, por ke ĝi ne surprize ataku vin,

kiel hordo da banditoj atakas naivan migranton, ligas lin kaj rabas lian posedaĵon!

Mi donis *min* al vi kiel mian plej altvaloran *posedaĵon*, ĉar vere: *mi posedas min mem!* – – Sed vi ankoraŭ ne scias, ke vi havas en vi ion pli grandan ol eĉ tion plej grandan de via imago, ĉar vi ankoraŭ ne venis *al vi mem*. – – –

Ĉion, kion vi opinias estanta *super* vi, vi portas *en* vi mem!

Aĥ, ke vi volu lernigi viajn okulojn, kiuj estas direktitaj supren, rigardi *en vin mem!* –

Lernu trovi *vin mem* en la interno de via *plej-interno*, por ke vi *en* vi mem povu renkonti *min!* – – –

AMO

Vere, mi *amas* min mem, kaj vi estu egala al mi kaj *amu vin* super *ĉio*!

Ne vian *korpon*, nek ion alian, kio je vi *krome* diras „*mi*“, vi tiel amu „super *ĉio*“, kvankam vi *ĉiam* interligos vin en amo kun via korpo kaj viaj nevideblaj fortoj!

„Super *ĉio*“ vi amu nur *vin mem* en la *plejinterno* de via interno, – *vin mem*, kiu en si entenas *min!* – – –

Ami „super *ĉio*“ signifu al vi: ami *vin mem pli* ol *ĉion*, kio estas *ekster* vi, kaj se vi tiumaniere amas vin mem, vi tiam en vi mem trovos vian *plej altan* amon en *mi!* –

Oni donis al vi tre eraran instruon, se vi kredas, ke vi devas ami *ĉion!*

Via *plej alta* amo, kiun vi povas trovi nur en *mi*, lerninte ami *vin mem*, estas libera de *ĉiu objekto* de amo, kaj kelkaj homoj, kiuj nur duone ekkonis tion, kio estas ekkonebla, konkludis, ke la amo devas ampleksi *ĉion*. – –

Sed mia amo sekvas nur la *leĝon* en mi imanentan kaj estas entenata *en mi mem*. – – –

Ĉion, kion *ĝi* volas ampleksi, *ĝi* devas tiri *en* min mem. – –

Sed en *mi* estas *nenio*, kio ne *volas* min mem! – –

Tial ankaŭ vi, kiam vi amas *eksteren*, direktu vian amon kun saĝa elektado!

„*Ne ami*“ certe ne signifas al vi „*malami*“!

Vi devos *lasi ekster via amo* multon, kiun vi tute ne „*malamu*“!

La *plejmulton* de tio, kio estas ne vi *mem*, vi devos renkonti estante *libera de amo kaj malamo* ...

Vi *amu* tion, kio venigas vin al vi *mem*, kaj sekve al *mi*!

Ĉio alia staru ĉiam *ekster* via amo! – – –

Sed kiel vi povus scii *ami* tion, kion vi devas ami, se vi ne amas *vin mem*, – vin mem, en kiu sola via *plej alta* amo povas malkaŝi sin al vi?!–

Antaŭ ol vi sondis *vin mem* kaj amas vin mem „*super ĉio*“, via tuta amo direktita eksteren estos nur *ŝajno kaj trompaĵo*. – –

Vi trompos *vin mem*, se vi antaŭe *kredas* „ami“, kaj tio, kion vi *pretendas* „ami“, estos trompita de vi...

Nur tiam vi fariĝos vera *amanto*, kiam vi scias ami *vin mem*! –

Ĉiuj grandaj amantoj estis ĉiam en la amo de si mem, amis *sin mem* per la tuta ardo de *amo*!–

Sed sciu, ke ankaŭ tie, kie vi *ne amu*, vi multe malpli devas doni vin al la *malamo*, se vi volas atingi *min* en via *plej alta* amo!

Ke vi sentas vin *kapabla* malami, tio estu al vi pruvo de via forto *ami*, – sed ne ĉio, por kio vi sentas kapabla, utilas al vi por atingi *vin mem!* – –

Ami estas la granda *jesado* de tio, kion vi amas, *ne ami* la *neado*, – – sed *malamo* estas la konfeso de *senpoveco*: de la nekapablo forigi tion neatan de sur via vojo!

Sed ĉio *neata* estu al vi kvazaŭ *ne* ekzistanta!

Vi ne plu *volu* vidi ĝin kaj sendi al ĝi la *fortojn*, kiujn ĝi konstante ricevas per la *atento*, kiun vi donas al ĝi.

Sed se vi lasas la *malamon* efektiviĝi en vi, vi senĉese *nutras* tion malamatan per *viaj* fortoj, kaj vi devos zorgi, ke ĝi ne fariĝu monstro englutonta vin...

La veraj amantoj, kiuj *trovis min* en sia *plej alta* amo, certe ne estis lamaj *dirantoj de jes kaj amen* al ĉio, kion ili renkontis, kaj ili povis *fortoplene nei* tie, kie estis necese, sed neniu el ili iam donis sin al la malamo! –

Tiel ankaŭ vi penu fariĝi *mastro* de la malamo, kaj se vi eble *hodiaŭ* ankoraŭ ne sukcesas, vi *morgaŭ* estos *venkinta* ĝin, se vi restas gardema kaj penas *levi* vin *super* la malamon. – –

Ju pli vi *ekkonas*, ke via tuta malamo nur *nutras* tion malamatan, des pli frue vi *eligos* vin el la malamo!

Multaj *fontoj de malbono* sur tiu ĉi tero jam antaŭ longe estus *sekiĝintaj*, se ne la *malamo* ĉiam denove igus ilin superflui! –

Se vi vere volas, ke io detruema forkonsumiĝu en si mem, tiam vi bezonas nur tute *forpreni* vian amon de ĝi! – –

Dum vi ankoraŭ restas *aktiva* en via laŭopinia „neado“, vi ne vere *neis!* –

Tio, kio ŝajnas al vi inda je *neado*, devas plene *foriĝi* de via atento, kaj vi ne plu devas iamaniere rigardi ĝin atentinda. –

Tiel la neitaĵo estas *reale* senfortigata, kaj via *amo*, nun libera de ĉiu kateno, povos *jesi* tion, kion ĝi amas! –

En via *plej alta* amo vi tiam trovos en *mi* la *plej altan jesadon*, kiu en si mem eterne amas nur *sin mem!*

AGADO

Sopirante vi pasigas la noktojn maldorme kaj vokas min, por ke mi vin elaŭdu ...

Mi *scias* pri via vokado kaj volas rapide helpi vin, sed vi ankoraŭ *rifuzas* mian manon kaj atendas *alian helpon!*

Certe vi serĉas *min*, sed vi ankoraŭ ne *konas* min, kaj vi atendas trovi anstataŭ mi *iun alian*, kiu konformas al tio, kion vi *faris* el mi per la krea potenco de via fantazio ...

Aĥ, mi dezirus, ke mi povu transformi min en la figuron de vi revatan, por ke vi *ekkonu*, kiu proksimiĝas al vi! --

Sed mi estas eterne *neŝanĝebla*, estante mia propra *leĝo* kaj la *sekvo* de *mia* leĝo, tiel ke mi konstante *restas* tiu, kiu mi *estas*, kaj neniu ardanta deziro pri ŝanĝo iam atingas min. ---

Vi mem devos ŝanĝi la *bildon*, laŭ kiu vi *kreis* min al vi, tie, kie vi estas kreanto! --

Alie vi *neniam* ekkonos min, kaj mi devus resti por vi kvazaŭ *fremdulo*, -- mi, kiu estas al vi la *plejproksimulo*, ĉar vi kaŝas min *en vi*. --

Antaŭ *vi mem* vi kaŝas *min*, por krei al vi *idolon*, en kiu vi kredas trovi min!

Malsaĝo tenas vin *katenita*, dum ĉiu *saĝo loĝas* en vi!

Eble temas pri la malsaĝo de *aliuloj*, kiu tiel katenas vin, sed nur *vi mem* kapablas *malligi* viajn katenojn!

Se vi ne *volas* ekkoni min *tia*, kia mi *estas* en mi mem de eterne, vi serĉos min en ĉiuj sferoj de la universo kaj tamen ne trovos min! – –

Via tuta profunda sopirado neniom utilos al vi, ĉar *eĉ se* mi plenumas vian sopiron, mi restas *fremda* al vi, kiel iu, kiun vi senatente preterpasas ...

Vi unue devos *radikale* ŝanĝi la *bildon*, kiun vi kreis al vi, se ĝi vere montru *miajn* trajtojn! –

Vi certe devos instrui vian okulon vidi *alimaniere*, se vi volas ekkoni *min* *tia*, kia mi *estas* de eterne ĝis eterne! – –

Vidu: *mi mem* estas la *forto* de mia leĝo kaj ne povas fuĝi de *mi mem*, eĉ se mia amo al vi povus min movi malligi min el mia propra *esto* por fariĝi savo *al vi*! – – –

Sed ĉar mi amas vin, mia volo ne volas, ke via serĉado plue sekvu erarajn vojojn, kaj tial hodiaŭ vi *aŭdas* mian *voĉon* kiel la voĉon de tiu, kiun vi ankoraŭ ne konas ...

Mi certe volas esti al vi *savanto* kaj *liberiganto*, sed *vi mem* devas *voli*, ke *okazu* al vi laŭ tiu mia vorto. – –

Vi mem devas forgesi ĉiun *bildon* por proksimiĝi al la *realo*, kaj ĉion, kion naskis al vi via *fantazio*, vi devas taksi kiel *iluziaĵon*. – –

Vi devas finfine lerni diri al vi, ke *ne* ekkonis min tiuj, kiuj *instruis* vin kaj sciis diri al vi multon da konfuzaĵoj pri mi, ĉar ili vidis min kiel iun el la *siaj*, kvankam estantan *pli potenca* kaj *pli granda*, rilate ne nur *sanktecon*, sed ankaŭ *kulpon*, – ĉar se mi *estus* tio, kion ili *faris* el mi, tiam ĉi tiu produkto de malsaĝa opiniado devus, kiel *kontraŭulo de si mem*, esti en eterna *batalado* kun si mem

Sed mi estas eterne *unueca*, bazita en mi mem, kaj nenio en mi povas kontraŭi min mem!

Vidu, mi estas plej alta *ago!* – – –

Mi mem estas al mi *efiko* kaj *celo!*

Mi mem estas al mi *origino* kaj *sekvo!*

Ne via serĉanta *sopirado* povas min atingi, alie vi jam antaŭ longe estus trovinta min! –

Nur en *agado* vi povos trovi min en vi, kaj nenia turmento de sopirado en timigaj noktoj faros min tiom esence *ekkonebla* al vi, kiel *unu* konscia *ago*, en kiu via serĉado vere strebas renkonte al mi! – – –

Sed ne pensu, ke estas via ago *per si mem*, kiu faras *min* ekkonebla al vi!

Vi certe devas konsideri, kion via ago *rezultigas*, kaj ĉu ĝi vere kaj nedubeble *povas* konduki al *sekvo* en la *direkto* de via serĉado, kiu strebas al *mi*. – –

Se tiam *certiĝas* al vi, ke via volo iras sur *ĝustaj vojoj*, ne hezitu pli longe kaj ne preterlasu la bonan horon, kiu trovas vin agopreta kaj kuraĝa!

En konscia ago vi tiam renkontos *min* en *vi mem* kaj estos *unuigita kun mi en vi!* –

En konscia ago mi mem volas *sperti* min en vi, kiun mi amas! –

En konscia ago vi fariĝu al mi *signo* kaj *atesto!* –

Tiel mi volas perfektigi vin *en vi*: – vi, kiu povas perfektigi sin nur *en mi!* –

Generite el mi, *naskiĝu ago* el vi, por ke ĝi pluge-nerante efiku laŭ mia eterna volo!

Vi mem estu naskata al mi en sankta naskiĝo, per via maldorma, de vi mem volita, libera *ago*, farita en maniero vere inda je liberulo! – –

BATALO

Jen mi, la *unueca* en si mem, tamen fariĝas la kaŭzo de eterna *batalo!*

Ĉio, kio volas atingi *min*, povas atingi min nur per *batalado*. – –

Nur kiel *premion de batalo* vi *min* akiros!

Mi mem neniam estos *tuŝata* de tiu batalo, ĉar *mal-konkordo* ne havas lokon en *mi!*

Kiu ankoraŭ devas *batali*, ankoraŭ ne estas ĉe *mi...*

Sed kiel vi povas trovi min en vi, se vi ne scias *batale* venki en vi ĉion, kio kaŝas min al vi?! –

Sen *batalado* vi povos *forigi* *neniun* de la *obstakloj* barantaj vian vojon!

Vi devas fariĝi *venkinto* en tiu ĉi batalo, se *mi* ne restu eterne neatingebla al vi! – –

Estos *batalado*, kiu vere bezonas vian tutan *enerĝion!*

Estos *batalado*, kiu postulas vian tutan *persistecon!*

Estos *batalado*, en kiu vi *ne* devas *laciĝi*, antaŭ ol vi *venkis ...*

Vi ne povas atingi la *venkon*, se vi ne estas preta streĉi ĉiujn viajn fortojn por *servigi al vi* ĉiun obstaklon barantan vian vojon! –

Vi vere ne volu *mortigi* en tiu ĉi batalo, ĉar tio, ki-
on vi mortigus, portas en si fortojn, kiuj *helpas* vin
batale atingi la finan venkon, se vi subigas ilin al via
volo. — —

Jam multaj eliris por fari tiun batalon, sed post
mallonga tempo ili perdis la kuraĝon kaj paktumis
kun ĉio, kio kontraŭstaris al ili ...

Tiel superfortite, ili revenis kaj vokis al ĉiuj volan-
taj batali: „Estas neeble venki en tiu ĉi batalo!“

Sed en ĉiuj tempoj ekzistis kelkaj, kiuj tamen sciis
batale atingi la *venkon*, kaj ili revenis ornamitaj per la
eterne verda laŭro de la venkinto.—

Ankaŭ *vin* mi volas vidi kiel *venkinton!*

Jen mi konsilas al vi: dum la batalo *neniam forge-*
su, ke ĉio, kio kontraŭstaras al vi, *avide atendas*, ke
via *volo al venko forlasu* vin!

Neniam batalanto estis *venkata*, kiun tiu volo ne
antaŭe forlasis ...

Vi eble ofte *malsukcesas* en via batalado, tamen la
fina *venko* certe ne estos perdita al vi, se vi ne defini-
tive *perdas* la *volon* al venko, kiu estas *fido* pri via
venko! — — —

Sed ĉiu batalo, kiu nutras *la volon al mortigado*,
estigas *novajn* batalojn, eĉ se vi unue ŝajnas esti ven-
kinto.

Tial vi ne volu *mortigi* en tiu ĉi batalo!

Viaj *plej fidelaj* servantoj estos ĝuste *tiuj*, kiujn vi per alta kuraĝo en la batalo *venkis!*

Ili tiam konas en *vi* sian *mastron* kaj *obeos* vin en ĉiuj danĝeroj.

Kun ilia helpo la batalo fariĝos al vi *ludo* kaj plunenio povas malebligi al vi la *venkon!* — — —

Sed ne forgesu, ke ĉiuj ĉi *malamikoj*, kiujn vi faru viaj servantoj, ke *batalo* kaj *venko* kaj *batalejo* estas troveblaj nur *en vi mem!*

Ankaŭ kiam vi kredas devi batali *eksteren*, la vera, *decida* batalo devas esti kondukata nur *en vi mem.* — —

Vi ankoraŭ subfalas al *trompiĝo* kaj havas mil zorgojn pri tio, kiel vi agu kontraŭ la *ekstera mondo!*

Kio *ĉi tie* premas vin kaj eble vin ŝajne venkas, tion vi ankoraŭ *taksas multe tro alte!*

Vi ankoraŭ perdas la *fidon al vi mem*, kiam oni kure faligas vin de *ekstere!*

Ho, se vi finfine fariĝus vidanta por ekkoni, ke ĉia *ekstera* venko kaj ĉia malvenko en la *ekstera mondo* estas nur malsaĝa *trompiĝo!*

Nur tio, kion vi servigas al vi en via *interno*, estos vere *venkita!*

Nur kiam vi en via *interno* finfine atingas la venkon, vi nomiĝos por mi *venkinto!*

Nur *tiu ĉi* venko *en vi mem* faros *min* premio de batalo por vi!

Mi vere ne donas min al iu, kiu ne akiras min kiel *premion de batalo!*

Vere senvalora kaj vanta estas ĉio, kio montriĝas atingebla sen batalado!

Ĉiu vera *valoro* povas fariĝi via posedaĵo nur per *batalado!*

Nur kiel *batalanto* vi povas atingi la venkon!

Sed vi devas iri renkonte al mi kiel *venkinto*, se mi *atentu* vin, kaj mi povas unuigi min por eterne nur al venkinto, kiu ne timis la *batalon!*—

Tial estu kuraĝa kaj ne fuĝu for de la *batalo*, kiu promesas al vi tiom altan premion kiel gajnon! — — —

PACO

Al *paco* sopiras via animo, – al tiu *paco*, kiun la mondo ne povas doni.

Sed nur post sentime trapasita *batalo* doniĝos al vi tiu *paco*, al kiu vi sopiras *vane*, dum vi hezitas kaj ne kuraĝas eniri en la *batalon*.

Sed kiam vi revenas al vi mem kiel *venkinto*, plu *nenio* ĝenos vian *pacon!* – – –

Multaj pensas, ke, kiam ilia batalo *finiĝas*, ili atingis la *pacon*.

Estas *malsaĝe* pensi tiel, ĉar la *fino* de la batalo povas esti via *pereo*, se vi ankoraŭ ne ekkonis, ke *neniu* batalo devas esti *finata pro la atingado de paco!* –

Neniam iu batale akiris la veran *pacon*, kiu ne portis en si la volon fini la batalon nur kiel *venkinto!*

Sopiro al *paco* estas granda *delogo*, kaj ve al tiu, kiu *subfalas* al ĝi!

Tiu delogo faras lin *sendefenda predo* de liaj nevideblaj malamikoj kaj senprotekta *viktimo de ilia arbitro* tie, kie eĉ *senvenka rezisto* estus deviginta la malamikojn meti siajn armojn en *lian* servon ...

Tial, se vi volas la *pacon*, ne lasu rabi al vi la kuraĝon *batali*, kaj *ne ĉesu* batali, ĝis viaj internaj malamikoj *mem* proponas al vi la *pacon!* – –

Nur tiam vi vere *ĝojos* pri via *paco!* –

Antaŭe via laceco pro batalado delogos vin al *ŝajna* paco, kaj tio, kion vi kredas esti *atinginta*, lasos al vi nur jenan elekton: aŭ fariĝi por ĉiam *sklavo de viaj malamikoj*, aŭ komenci *novan batalon*, en kiu vi eble scias batali *tiamaniere*, ke povas doniĝi al vi la laŭro de la *venkinto* ...

Oni jam tre ofte konsilis vin *malĝuste* kaj diris al vi, ke ĉiu volanta atingi *min* devas serĉi nur la *pacon*. — —

Sed mi volas viglajn *batalantojn*, kaj paco, kiu ne falas de la arbo de sorto kiel *matura frukto* de batalado, estas por mi *malestiminda* kaj ankaŭ vere *malŝaĝa*, ĉar mi povus savi vin pli facile, se vi estus *venkita* en la batalo, ol se via *manko de kuraĝo* igis vin forlasi la batalejon. — — —

La *herooj* de la granda batalo, al kiuj *mi* fariĝis eterna paco, sciis batali *ĝis la lasta guto da sango* en iliaj vejnoj, kaj vere: *ili* batalatingis la *venkon*, eĉ se ofte ŝajnis, ke ili estis nur *viktimoj* en siaj bataloj. — —

Ne aliamaniere mi volas ankaŭ *vin* iam vidi *venki!*

Ne aliamaniere vi trovu en mi la *eternan pacon!* —

Paco signifas al mi la *sekurecon* de tiu, kiu batalakiris la certecon, ke plu *nenio* povas inviti lin al *batalo!*

Paco estas nur tiu *trankvileco en si mem*, kiu estas la premio kaj ekflamiganta celo de ĉiuj internaj bataloj!

Paco estas libereco de ĉiu devigo eniri en novajn batalojn!

Paco estas al mi la potenco akirita super ĉio, kio antaŭe nomiĝis malamiko kaj kontraŭulo!

Kiu trovis tiun pacon en si mem, tiu sola povas trovi en mi sian eternan pacon! — — —

Al li mi estos la ŝirmejo de lia paco! — — — —

Al li doniĝos en mi tiu paco, kiun „la mondo“ ne povas doni, — la paco, kiu doniĝas nur al tiuj, kiuj, venkinte en si mem, fine scias batalakiri min! — —

FORTO

Vi ankoraŭ vane serĉas fore *ekster* vi mem la *forton*, kiu povus helpi vin *venki* en la batalo kaj havigi al vi *eternan pacon*.

Ankaŭ ĉi tie vi ankoraŭ iras sur eraraj vojoj kaj disipas vian energion por flagranta trompo!

Vi eterne povus vane serĉi en ĉiuj spacoj de l' universo, se vi ne hodiaŭ volas kontempleme turni vin *al vi mem!* –

Nur *en vi mem* vi renkontos *min*; kaj *mi* sola estas tiu, kiu sin donas al vi kiel la *forton por venki!* – – –

Mi estas la forto, kiu majstras ĉiujn fortojn, ĉar nur el *mi* originas la aganta energio de ĉiuj fortoj!

Ne trompu vin kaj ne konfuziĝu pri mi, kiam vi vidas, ke tiuj fortoj kontraŭstaras sin reciproke kiel *oponantoj!*

Mi elsendas el mi mem infinitoblajn fortojn en infinitoblaj formoj en ĉiujn fenomenajn mondojn, kaj nur *sekve* de iliaj *kontraŭoj* ili kapablas efiki ...

Eterne mortaj kaj malvarmaj kaj rigidaj estus la mondoj, kiujn mi eterne *kontraŭstarigas* al mia estado kiel plej eksteran *kontraŭaĵon*, se la fortoj fluantaj el mi tra tiuj mondoj ne *restus* en eternaj kontraŭoj! – –

Sed *mi* estas en mi mem la *forto* kaj *vivo* de ĉiuj ĉi interkontraŭstarantaj fortoj, kaj *en mi* ili trovas sian

unuigon, kiom ajn forte ili devas *strebi disen* en la fenomenaj mondoj ...

Ĉu ne estas malsaĝe, se vi klopodas, per grandega penado, fari unuopajn fortojn viaj *amikoj*, aŭ se vi provas akiri *regopovon* super aliaj fortoj per ruzo kaj rezisto? Ĉar vi povus fariĝi *mastro kaj majstro* de ĉiuj fortoj, se vi volus trovi en *mi vin mem!*

Vere, vi mokridus ĉiun, kiun vi povus vidi *aganta* en la ĉiutaga vivo de la ekstera, vin ĉirkaŭanta mondo *en la sama maniero*, kiel oni vin trovas aganta en *nevideblaj* regnoj! –

Sed *nenio ligas* vin, kaj vi povas *eĉ hodiaŭ* eligi vin el tiu malsaĝo, tuj kiam vi kreas en vi la *volon*, kiu volas plu *nenion alian* ol konduki vin en mi, en via plej interna interno, al via perfektigo! – – –

En vi mem vi tiam posedos la tutan *forton* por triumfi super ĉiuj fortoj de ĉiuj mondoj kiel *venkinto!*

En vi mem vi tiam trovos ĉiujn kontraŭojn unuigitaj!

Vi mem regos en konstanta interagado ĉion rezistantan en vi tiumaniere, ke, kvankam la fortoj restas en sia kontraŭeco, ili tamen formas sanktan *unuigon*...

Nur kiam vi trovis vin mem en *mi*, vi povas sukcesi en tiu alta miraklo!

Vi tiam estas ne plu sur *tiu* aŭ *tiu ĉi* flanko, sed en la *plejinterno* de la forto, kiu estigas el si mem ĉiujn fortojn!

Nur en *mi* vi povas ricevi la *certecon*, kiu donas al la *volo* al venko certe ankaŭ la *venkon!*

Kiam vi estos trovinta vin en *mi*, en *mi-unuiĝo* en via plejinterno, neniuj fortoj en ĉiuj mondoj povos plu timigi vin. — —

La kronon de venkinto neniuj potencoj de la infero povos rabi al vi, ĉar tio, kion vi tiel nomas, estas nur *kontraŭago* de la fortoj, kiujn vi tiam *regos!* — — —

VIVO

Vi estas *mistera* al vi mem, kaj tute prave!

Vi trovas vin bazita en la ekzisto kaj portas *en vi mem* la *praan fundon* de via ekzisto; sed vi ankoraŭ serĉas, en ĉio kio eterne restos al vi „*ekstera*“ kaj „*fremda*“, la fundon kaj eksteran *pra-kaŭzon* de via vivo, dum via serĉado povus igi vin *trovi nur tiam*, se vi volus enprofundiĝi en *vin mem* kaj en vian propran plej profundan profundon! – – –

Tie *mi mem* estas la *fundo* de via ekzisto, kaj nur *en mi* vi povas trovi la *kaŭzon* de via ekzisto! –

Vi kutimas paroli pri via „*vivo*“, kvazaŭ ĝi estus forto elĉerpanta sin mem, el kiu fontas via ekzisto; sed vi troe fidas la *ŝajnon*, kiu trompas vin, ĉar la ekstera *fenomeno* de via korpo ŝajnas esti aperinta el la nokto de neestado kaj iam esti dissolviĝonta en nenio kaj nokto.

Kio mallonge tenas tiun *fenomenon* en ekzisto, tion vi erare nomas *via vivo!*

Vere, se vi malsaĝe opinias, ke tie ĉi estas perceptebla *via vivo*, vi subfalis al *granda iluzio!*

Vi devos fosi en vi pli profunden, se vi volas iam explore sondi vian *realan* vivon!

Antaŭ ĉio lernu ekkoni, ke *via vivo* ne estas io *ekstere* de vi, – ke *via tuta scio* pri vi mem estas nur

scio pri la *efikoj* de tio, kio en vi spertas sin mem kiel propra-fundan *vivon*...

Sed *estas mi* tio, kio tiel malkaŝas sin *kiel vian vivon*, kaj nur kiam vi trovis *min* en vi, vi estas konscie unuigita kun via vivo!

Antaŭe vi ankoraŭ prenas la *efikon* por la kaŭzo, kaj tio, kion vi sentas kiel vin mem, estas nur la *reflekto* de tiu vivo, en kiu via *eterna* konscio pri vi mem estas donita al vi en *mi*; ĉar jen mi donacis al vi *min mem*, por ke vi, per mia forto, trovu *vin* eterne bazita en *mi!* — — —

Provu igi vin mem ekkoni kaj kompreni, ke mi estas pli proksima al vi ol ĉio alia, kion vi sentas diferenca de vi, — — *mi*, kiun vi vane serĉas en la plej fora malproksimeco, sed tiam, ne trovinte min tie, vi subfalas al la eraro, ke por vi kaj viaspeculoj mi estas netrovebla! —

Multaj serĉis en la plej ekstrema *foreco* tion, kio estis tro *proksima* al ili, ol ke ilia rigardo konstante direktita *eksteren* povus percepti ĝin.

Sed mi estas eterna *estado-en-mi-mem*, kaj nenio estas *ekster* mi por mia ampleksado; — ĉu mi do povus esti perceptebla al vi, kiu estas entenata en mi, iel *aliamaniere* ol *en vi mem?*! —

Ankaŭ via *plejeksteraĵo* estas por mi plej internaj esto kaj propraĵo, kaj vere, vi tre erarus, se vi supozus, ke en tiu malproksimeco, kiun via rigardo

esploras por trovi min, mi ne estas trovebla por tio, kio *tie* vivas el mi! – – –

Same kiel vi povas teni vian teran korpon vivanta nur, se viaj pulmoj trovas *en vi mem* aeron por spiri, kaj kiel ĝi devus forlasi la vivon, tuj kiam ĝi ne plu povus *en si mem* utiligi la aeron, kiu fluas ĉirkaŭ la planedo Tero eĉ *plej fore* de la loko, kie vi spiras, – tiel same *mia esto* neniam povas unuigi sin al vi, se vi serĉas min *ekstere* de vi! –

Mi malkaŝiĝas al vi nur estiel *via propra vivo!* – –

Vane vi tramigrus ĉiujn mondojn por serĉi min!

Nur *en vi mem* mi estas *via* mondo! – –

Tio, kion vi nomas „*konscio*“, estas nur la pri si mem certa *spiegula bildo de eklumantaj animoatomoj*, komparebla kun la bildo ricevata de kuracisto sur speciala ekrano, dum li pasigas tra via korpo la radiojn, kiuj kapablas trapasi densajn, opakajn objektojn...

Same kiel la ekrano, kiu videbligu tiujn radiojn, devas esti *preparita* laŭ certaj reguloj, se ĝi montru sentrompan, lumantan bildon de la interno de via korpo, tiel same ankaŭ *vi mem* devas *prepari* vin, se vi volas fariĝi al vi mem la spegulo de via plejinterno! –

Ne pli frue vi esploros *min* en vi estiel viajn plej internajn eston kaj vivon, ol kiam vi kun maldorma volo *preparis* vin mem, tiel ke viaj animoatomoj lumante reflektas al vi la bildon de via vivo!

Sed tiam vi trovos en tiu bildo vin mem *unuigita kun mi*, ĉar tio, kio tiumaniere eklumas, estas vere *mi mem*, tia kia mi spertas min *en vi*. — —

Malluma restas ĉio, kio estas ne *vi mem*, kvankam mi traradias ankaŭ tion! —

Malluma restas ĉio, kion vi ne *preparis* kun maldorma volo!

Kiel tiuj misteraj *fizikaj* radioj, pri kiuj mi antaŭe parolis, mi restas neperceptebla al *nepreparita* animo...

Sed se vi mem *preparis* vin en vi, vi eklumos en mia propra lumo, kaj mi malkaŝos min al vi en vi mem estiel *vian propran vivon!* — — —

LUMO

Sennombrajn specojn de lumo vi povas ekkoni sur tiu ĉi tero, kaj tamen ĉiu speco de lumo, kiun via okulo povas ekvidi, estas multe superata de tiu *unika* lumo, kiun sendas al la tero tiu malproksima suna fajro, kies radiada forto formas la plej grandajn kaj la plej malgrandajn aferojn sur tiu ĉi planedo. –

Sed eĉ tiu ĉi plej potenca lumo, kiun terhoma okulo perceptas, restas malklara brileto kompare kun *tiu* lumo, kiu povas atingi vin el *spiritaj altoj*, tuj kiam vi fariĝas kapabla enpreni ĝin ...

Ne temas pri vanta ludo per bildaj komparoj, se estas parolate al vi pri spirita „*lumo*“! –

Kio venas al vi el *spirita* regno, tio vere estas „*lumo*“, kaj ĉiu surtere perceptebla ekstera lumado povas esti nomata „*lumo*“ nur laŭ tio, ke ĝi plenigas vian animon *per simila sento* kiel tiu praforto, kiu, atingante vin el altaj *spiritaj* sferoj, sin malkaŝas al vi kiel „*lumon*“ ...

Pri *tiu* lumo, kiu brilas „en la mallumo“ kaj kiun la mallumo neniam povas venki, unu el la miaj parolis al vi, ke ĝi estas la „*vivo*“, – kaj vere: liaj vortoj sciigas *veron!* –

Nur tiu, kiu trovis min en si mem estiel sian propran *vivon*, povas ankaŭ atesti pri la *lumo!*

Per sia pragerita senlima potenco tiu lumo de la spirito eterne lumigu vian tutan plejinterton!

Vi mem eklumu por ĉiam en la lumado de tiu ĉi lumo, kaj via lumado ne havu finon! – – –

Same kiel arte tajlita diamanto povas elsendi sian internan fajron nur tiam, kiam tera lumo trafluas ĝin, tiel same ankaŭ vi ne povas brili el via plejinterno tiom longe, dum vi ankoraŭ amas la mallumon kaj kaŝas vin for de mi, – for de mi: la lumo, kiu estas *vivo* por ĉio ekzistanta kaj *eterne lumas el si mem* en abunda radiado kaj sen ĉeso! –

Vere, vi heligos *al vi mem* ĉiun mallumon, kiam *en mi* vi trovos vin lumanta!

Ĉiuj mirakloj de vi mem malkaŝu sin al vi, kaj ĉio, kio vin ĉirkaŭas, eklumu reflektante la lumon, kiu tiam plenigas vin! –

Sed ankoraŭ sufiĉas al vi, ke vi kuŝas en mallumo kaj nur *sopiras* al la lumo, kvankam vi sentetas, ke vi *kapablas* eklumi en ĝiaj radioj, kiel kristalo, kiun subite trafas la lumo de la suno.

Eĉ se vi de tempo al tempo povas eligi vin el via neagemeco, vi estas kontenta, kiam atingas vin el malklara lumigilo iu ajn radio, kiu tiam ellogas el via plejinterno malhelan ardon, – senfortan brileton, kiu ne kapablas heligi *vin mem* kaj multe malpli la mallumon de via medio! –

Vi pensas, ke via tuta kapablo lumi estas do sufiĉe konfirmita antaŭ vi mem, sed tuj poste, kiam tiu malklara lumigilo malproksimiĝas de vi, vi ree troviĝas en mallumo ...

Vi eble montras plej mirige belajn facetojn kaj povas, estante plene konscia pri via valoro, prave ĝoji pri via nobla formo, sed tamen vi neniam spertos vin el via plejinterno, kaj kiel *fremdulo* vi havos *nenion por diri* al vi mem tiom longe, dum vi restas en tiaj pezeco kaj rigida inerteco! – –

La jaroj de via tera vivo forkuras, kaj ĉiu solstico trovos vin en la sama loko, katenatan en la sama mallumo, ĝis iam via laca okulo fermiĝas por ĉiam antaŭ la lasta por vi sunradio kaj vi, restante en sama mallumo, eĉ ne kapablas plu vidi la *eksteran bildon* de la esenca lumo, bildon, kiu en la densa mallumo de via interno aperis almenaŭ kiel konsolo al vi ...

Vane vi tiam provos vekti en vi senton eĉ nur *similan* al tiu, kiun via terhoma ekzisto antaŭe povis trovi almenaŭ *en la lumo de via surtera tago* ...

Ĉio en vi kaj ĉio ĉirkaŭanta vin estos, malgraŭ ĝia palpebleco, kaŝita en plej profunda mallumiĝo, kaj tamen via sopirado al lumsentado estos nesatigebla ...

Eble dum eono, en turmentoplena nokto, vi pentos pri neutiligita surtera vivo, ĉiam estante predo de konfuza spertado en mallumaj regionoj, ĝis iam en fora

mondperiodo la unua brileto de la lumo ree doniĝos al vi ...

Tial unu, en kiu estis *abundo* de mia lumo, iam diris la profunde signifoplenan vorton:

„*Laboru, dum estas tago, ĉar venas*“ – por ĉiu, kiu ĉi tie ne laboris – „*la nokto, kiam neniu povas labori*“, ĉar li tiam estos por nekalkulebla tempo la predo de tiu mallumo, el kiu li ne eskapis dum sia surtera vivo, pro inertia kontentiĝemo kaj en la iluzio, ke konscia spertado de sia propra valoro estas sufiĉa riĉeco, tiel ke li min, *la esencan lumon*, ne bezonas. –

Jen mi venas al vi en tiu ĉi via surtera tago, *ĉar mi amas vin*, por ke vi *hodiaŭ*, kiam vi ankoraŭ *havas la potencon* fari tion, eligu vin el tia sorto! – – –

Kiam vi subfalas al la leĝo tie ĉi reganta, ankaŭ *mi* ne kapablas *malligi* vin el ties plue aganta potenco, ĉar *ĉiuj leĝoj baziĝas en mi mem*, tiel ke mi neus min mem, se mi volus liberigi vin *antaŭ* via tempo! – – –

Se vi hodiaŭ, kiam mia vorto venas al vi, kuraĝoplene *eligas* vin el la katenoj de mallumo, vi same sekvas *leĝon* bazitan en mi!

Estas sole *via afero decidi*, ĉu vi volas sekvi la leĝon de *libereco* aŭ tiun de *ligiteco*! – – – –

Vi mem fariĝis mastro de via sorto en la neimageble fora momento, kiam mi laŭ *via volo* ellasis vin el *mi*, kiu eterne *restadas en la momento*, por via memvolita migrado! – – –

Antaŭe vi spertis vin mem en mi, *en konstanta spertado de la momento*, spertante kvazaŭ la konstantan *transversan sekcon* de ĉio ekzistanta; – sed *post via eliro* vi povis kaj povas sperti kvazaŭ nur la *laŭlongan sekcon* de ĉio ekzistanta, ĝis vi iam – ĉu laŭ la leĝo de *libereco* aŭ tiu de *ligiteco* – estas *reveninta* en vian elirpunkton, kiu estas *mi mem!* – – –

Plej profunda mistero sciiĝas al vi per tiuj ĉi vortoj, kaj *bone estas al vi*, se vi povas spirite kapti ĝin! –

Malfermu vian plejinternon, por ke tie resonu tio, kion mia vorto sciiĝas al vi!

En via plejinterno vi tiam ekscios, *kial* saĝuloj diris al vi, ke vi „*falis*“ vere profunden, kiam vi volis eliri el via plej alta alto en mi, malsupren kaj eksteren, en la mallumon, kiu nun ĉirkaŭas vin ...

Sed *ankaŭ tie ĉi*, en via mallumiĝo, vi ankoraŭ portas en vi la *forton relevi* vin al *mi* kaj al *via origina alto!* –

Vi ankoraŭ havas, kaj eterne povos konservi al vi, la saman formon, en kiu mi trovis vin en mi, kiam mi devis ellasi vin, ĉar via volo strebis ne al *alto*, sed al *profundo!* – – –

Vi ankoraŭ kapablas denove ekradii en *mi* – en la lumo de ĉiuj lumoj!

Sed *vi mem* devas movi vian volon al *reiro*, por ke vi finfine – erarvaginte tra malluma konfuziĝo dum eonoj antaŭ via naskiĝo en la terhoma animalo – re-

trovu la regionon de eterna *lumo*, kiu estas *mi mem*,
por denove *vivi* en mi por eterne!

Vidu, mi *suferas* en vi, ĉar en mi mem mi ne *povas*
suferi kaj antaŭ mia *lumo* ĉiu sufero fariĝas *mensogo!*

Mi estas eterna *vero*, kaj ĉio, kio ne *plenumiĝas* en
mi, estas trompo kaj ŝajno!

Tial mi vokas vin, kiun mi amas, por ke vi *forlasu*
la mensogon, kiu manifestiĝas en vi kiel sufero!

Tial mi montras al vi la vojon el via mallumiĝo,
por ke vi en *ĝojo* ekradiu en mi – en *eterna lumo* –
antaŭ ol la mallumo povas denove ligi vin! – – –

En *mi* vi ŝanĝos vin mem en *ĝojon*, kaj ĉio, kio
estis sufero en vi, *defalos* de vi, kvazaŭ la krusto de
cikatriĝintaj vundoj, kaj ne plu malbeligos vin! –

Vi konsciiĝu pri vi mem kiel *ĝojo*, ĉar ne pli frue
mi povas malkaŝi min en vi kiel *lumo*, ol kiam vi
mem proksimiĝos al mi ŝanĝite en vi mem en *ĝojon!*–

Nur tiumaniere, ho kara, vi trovos min en vi mem,
kiel *lumon*, por tiam lumi en la radioj de tiu ĉi *lumo*
eterne! –

Tiel *vi mem* en *ĝojo* fariĝos en mi nura *lumo!* – –

FIDO

Vi atingos ĉion, kion vi *volas* atingi, se vi *fidas* mian vorton!

Vi jam volis atingi multon kaj *ne* atingis ĝin, ĉar via fido estis bazita tro malprofunde. – –

Via fido devas esti trovinta bazon en la plej profunda fundo de via konscio, tiel ke *neniu* okazo, kiu vin trafas, povas elradikigi ĝin! –

Kiel arbon, kiu donu al vi altvalorajn fruktojn, vi devas ĝin flegi kaj ŝirmi, por ke la animaloj de la sovaĝejo ne povu ĝin rongi, tiel malhelpante ĝian kreskadon.

Ĉiun ekkreskantan ŝoson vi devas frutempe forigi, por ke la trunko povu sin nutri per la tuta forto de la grundo kaj ke estu forprenata neniom de tio, kion ĝi bezonas por sia fortiĝo. –

Sed ankaŭ kiam la arbo de via fido jam montras branĉojn kaj branĉetojn sur alta, fortika trunko – kiam ĝia supro estas plene disvolviĝonta – vi kiel bona ĝardenisto devos atenti, ke ĉiuj troe kreskantaj branĉoj estas zorge pritrancataj, por ke sufiĉo de la forto de l' arbo eniĝu en ĝiajn fruktojn, tiel ke ĝi baldaŭ *povas* doni abundan rikolton. – –

Se vi ĝis nun ofte pensis, ke via fido *detruigiĝis*, mi diras al vi, ke vi tro malmulte zorgis pri tio, *ke unue*

via fido plene fortiĝu, antaŭ ol vi postulas de ĝi *fruktojn!* –

Se vi estas sincera kontraŭ vi mem, vi devos konfesi al vi, ke vi fidis kvazaŭ „*prove*“, kaj ke volita, arte nutrita sento de preskaŭ obstina certeco ŝajnis al vi esti la nelimigita *fido*, pri kiu vi estis aŭdinta, ke ĝi povas doni al vi magian potencon ...

Sed „*fidi*“ en *tia* maniero estas *aroganta* farado kaj vere ne povas alporti al vi benon! –

Se vi vere volas, ke la granda *fido*, pri kiu mi ĉi tie parolas, enradikiĝu kaj disvolviĝu en vi, vi devos gardi vin kontraŭ ĉia malsaĝo de opiniado kaj dezirado, ĉar tie ĉi efektiviĝu *io reala*, kaj tio reala ne povas montri sian efikon, dum iu formitaĵo de via *fantazio* lasas al ĝi tro malmultan spacon! –

Vidu, la *fido*, kiun mi volas trovi en vi, sekvas neŝanceleblan *leĝon*, kaj nenia arbitro povos tiel fleksi tiun leĝon ke ĝi montru sian efikecon, dum vi *malatentas* ĝian leĝecon, indiferente ĉu vi estas konscia pri via malatentado aŭ ne! –

Kaj certe *ne de unu tago al la sekvanta* tiu granda *fido* estos enradikiĝinta kaj disvolviĝinta en via interno!

Same kiel ĉio, kion vi en via tempa formo volas estigi, tiu fido bezonos *sian tempon de estiĝo*, kaj vi

trankvile devos kateni ĉiujn tro fruajn *dezirojn*, kiuj estus nur obstakloj por ĝi! –

Komencu per tio, ke vi vekas en vi ĉiujn fortojn de *sentado*, por tiamaniere antaŭsentante kompreni, *kio* estiĝu en vi!

Se vi eĉ nur *antaŭsentante* jam ekkaptis ĝin, tenu firme tion, kio doniĝis al vi, kaj metu ĉiujn viajn pensojn en la *servon* de via alta strebado protekti la tiel eksentitan ĝermon kontraŭ damaĝo!

Ne lasu forpasi eĉ unu tagon, sen denove *konsciiĝi* pri tio, kion vi jam kapablas antaŭsenti, kaj defendu vin kontraŭ ĉiuj pensoj de *dubo*, kiuj kvazaŭ flugetantaj birdoj provos *detrui* la delikatan ĝermon, antaŭ ol ĝi povas enradikiĝi en plej profunda grundo!

Ne rezistu al tiu enradikiĝo, sed *mem* malkompaktigu la spiritan grundon en vi kaj lasu ĝin al la agado de la roso de graco, por ke ĝi povu esti penetrata de la fajnaj radikoj, kiuj nutru vian fidon! –

Tiel vi vidos ĝin kreski pli kaj pli forte, kaj, kiel mi komence diris, vi devos zorgi pri tio, ke la animuloj de la sovaĝejo ne damaĝu ĝin, kaj ke troe kreskantaj ŝosoj ne forprenu ĝian forton...

Sed kiam tiamaniere via fido estas potence *disvolviĝinta*, vi devos provi, ĉu vi reale kultivis la *noblan kreskaĵon*, kies fruktojn vi sopiras ricevi. – –

Certeco doniĝos al vi nur per tio, ke vi alvokas vian *plejinternon*, petante ĝian respondon, kaj el via

plejinterno tiam venos al vi la *certeco*, ke vi vere povas atendi noblajn fruktojn, – escepte se vi dekomen- ce enmetis nur la impulson de viaj sovaĝaj *deziroj* en vian internan grundon. –

Antaŭ ol vi ricevas el via plej interna interno la *konfirmon*, ke via fido promesas noblan rikolton, vi en saĝa modesteco rezignu atendi *fruktojn!* – – –

Ĝis nun mi parolis al vi nur *en metaforoj*, sed ankaŭ *sen* metaforo kaj parabolo fariĝu komprenebla al vi tio, kio tie ĉi estu komprenata ...

Aŭskultu do kaj konsideru en via koro:

Estas praeterna *forto*, kiu ekefikis en vi!

Vi povas *vek*i tiun ĉi forton nur per la interna *mem-teno*, kiu en la lingvo de la homa buŝo nomiĝas „*fido*“. – –

Vi nun tute ne fidu blinde, ke iuj *deziroj* ĉiam plenumiĝas, se la *fido* pri ilia plenumiĝo ekzistas en vi!

Oni *postulas* de vi *ion pli grandan*, kaj vi *atingu ion pli grandan!*

Mi volas, ke vi fidu *min* senrezerve, kaj tiu absoluta fido implicas, ke vi ankaŭ lasas sole al *mi* la plenumadon de viaj *deziroj*. – –

Nur se vi transdonas sole al *mi* la plenumadon de viaj *deziroj*, vi povas atendi kun plena certeco, ke mi penas *plenumi* ilin! – – –

Ne pensu, ke vi devas preskribi al mi, *kiel* ili devas esti plenumataj!

Mi sola scias, kiel ili estas plenumebraj kaj ĉu ilia plenumo estos *beno* por vi! –

Mi sola scias ankaŭ, *en kiu maniero* viaj deziroj, kondiĉe ke ili ne kontraŭas *pli altan* leĝon en mi, povas trovi plenumiĝon! – –

Mi sola scias per certa scio, *kiam* estas atingita la *tempo* por plenumi al vi viajn dezirojn, kondiĉe ke ankaŭ *mi* povas rigardi ilin kiel dezirindajn! – –

Se vi povus en alia maniero *ŝtele* aŭ *ruze* atingi ilian plenumon, estu certa, ke la plenumo finfine alportus al vi nur *malfeliĉon*, kaj ke vi tiam devus *malbeni* la tagon de plenumo! –

Fidu al mi en la maniero, en kiu vi *devas* fidi: – per absoluta fido, kaj vi povas esti certa, ke mi plenumas al vi *ĉion*, kio servas al via bono kaj al la bono de aliuloj!

Ne plendu al mi, se mi plenumas *aliamaniere* ol vi imagis!

Ne plendu al mi, se mi *ne* plenumas tion, kio ŝajnis al vi facile plumebla, – se mi faras eĉ la *kontraŭon* de tio, kion vi nomus „plenumon“ de viaj deziroj!

Pacience atendu la *sekvon* de la okazado kaj nur *tiam* juĝu, ĉu mi *agis* por via bono, aŭ ĉu por via bono faris *ion alian*, por ke tiamaniere la fina celo sopirata de viaj deziroj estu atingata!

Senrezerva fido al mi kondiĉas, ke vi ne forprenos de mi vian fidon *eĉ tiam*, kiam *mia* maniero de plenumado en sia saĝo *ne* konformas al tio, kion vi *atendis!* –

Ankaŭ tiam fidu, kaj vi fine ekkonos, ke viaj deziroj vere *plenumiĝas*, eĉ se la vojo al ilia plenumiĝo unue ŝajnis al vi malbona ĉirkaŭvojo, aŭ elmetis vian fidon al malmola provo! – –

Sed pleje vi vidos, ke viaj deziroj *tuj* plenumiĝas, kondiĉe ke ili atentis la limojn, al kiuj estas submetita ĉiu okazado, kaj ke vi mem zorgis pri tio, ke plenumiĝis ĉiuj necesaj *antaŭkondiĉoj* por la plenumado de viaj deziroj.

Mi certe plenumos ne en *alia* maniero ol vi *atendas*, se vi ne *devigas* min al tio per la naturo de viaj deziroj!

Sed sciu, ke vi donu vin al via fido al mi *ne plue*, ol kiam *mi mem rajtigis* vin al tiu fido per la interna certeco donita de mi! – –

Vi kapablos *tute certe* senti en vi tiun internan certecon, *tuj* kiam vi *firmigis* en vi mem la internan *memtenon*, kiu eligas vin el ĉiu malsaĝa *iluziado* kaj montras sufiĉon da *forto* por servi al *mia* forto kiel fiksa levila apogopunkto ...

Sed antaŭe vi devas esti atinginta, eble eĉ kontraŭ plej fortaj internaj rezistoj, la ekkonon, ke vi ĉiam *bezonas* mian forton, – ke vi povas fariĝi nur la *apoga*

punkto, en kiu povas *evidentiĝi* mia forto, kiu estas konstante *en vi mem*. –

Vi mem devas fariĝi en vi *firma* kaj povi *fidi al vi mem*, antaŭ ol vi rajtas meti vian fidon sur *min!* –

En la sama grado, en kiu mi *povas* fidi *vin*, ĉar *vi fidas al vi mem*, vi rajtas fidi *min!* – – –

Jen al *tia* fido mia vorto konduku vin!

Tia fido trovu en vi grundon kaj nutron!

En *tia* fido vi vere atingos *ĉion*, kion ajn vi atingi *volas!* – – – – –

ILUMINIĜO

Per *lumo* mi volas plenigi vian animon, – mi, kiu *sin spertas en vi* kaj estas la eterna *lumado* en ĉiu lumo!

Nur el *mi* povas doniĝi al vi via *iluminiĝo*, kaj se vi serĉas *ekstere* de vi, ne estas trovebla iu lumo, kiu iam povus *ilumini* vin! –

Ĉiu lumo, kiun vi perceptas *ekstere*, originas el *mi*; – sed mi estas kaŝita en via *plej interna interno*, kaj nur *el via plej interna interno* mi povas plenigi vin per mia lumo! –

Mi mem, ho vi, kiu sin kaŝas en mallumo, estas ĉiu *lumo*, – *mi mem* estas la *lumado* de ĉiu lumo, – *mi mem* estas *iluminiĝo* al ĉiuj, kiuj sopiras min!

Mi montris al vi plej diversajn vojojn, kiujn vi devas iri ĝisfine, se vi volas atingi min.

Ne ĉiuj devas iri la *samajn* vojojn, sed ĉiu rekonos kelkajn el tiuj vojoj en *siaj* vojoj kaj tiam ne plu povos dubi, ĉu li estas sur la vojo *al mi* aŭ fidas nur al miraĝoj, kiuj logas lin pli kaj pli foren en la senfinan dezertejon de eraroj ...

Sed se vi kun interna konstanteco iris tiujn vojojn, en kiuj vi ekkonis la *viajn*, vi kun plena certeco finfine renkontos *min* je la fino de *unu* el tiuj vojoj, kaj tiam estos aperinta la tago, en kiu mi povas *ilumini*

vin, tiel ke ĉio, kio antaŭe estis malluma en vi, nun devas ŝanĝiĝi en *radiantan helecon* en *mia* lumo! – –

„*Illuminado*“ signifas: videbligi ĉion, kio antaŭe estis en mallumo kaj ne venis al ekkonado!

„*Illuminado*“ signifas: heligi ĉiujn angulojn en la domo de via animo, tiel ke povas resti neniu kaŝejo, kie venenaj bufoj kaj vipuroj povus renkonti vin!

„*Illuminado*“ signifas: plenigi la domon de via animo per *lumo* tiel, ke la puraj radioj de lumo elfluas foren en la valojn de mallumo, kaj ĉiuj noktaj bestoj timoplene moviĝas al siaj kavernoj!

Vi ofte jam kredis vidi klare en la malforta lumo, kiun donis al vi la tero, al kiu vi propravole ligis vin!

Tiam la lumo de la *intelekt*o ŝajnis al vi radii hele, kaj kion ajn ĝi prilumis, tio ŝajnis al vi esti fariĝinta tiom ekkonebla, ke vi apenaŭ sentis sopiron al pli hela lumo. – –

Vi iam ekscios, ke ĉio, kion via *intelekt*o ĝis nun ŝajne povis heligi al vi, ankoraŭ vere kuŝis en profunda *malhelo*; – ke vi ja ekkonis la konturojn, sed povis antaŭsenti nenion de tio, kion ili limigis! –

Ŝajnis al vi certa, ke ĉiu lumo al vi perceptebla povas nur de ekstere *prilumi* la aferojn; – sed nun malkaŝiĝu al vi, ke vi povas fariĝi *vidanta* en *mia* lumo, tiel ke la aferoj devas senvualigi al vi sian *plejinter-non!* – – – – –

Vere, ne estas malgrandaĵo tio, kio doniĝos al vi, tuj kiam vi per *amo*, *ago* kaj *batalo* trovis en mi la *pacon*, la *forton* kaj la *vivon*: – en mi, kiu estas en vi la *lumo*, kiu *iluminos* vin por eterne! – – –

Ekzistis ne malmultaj, kiuj strebis al *iluminiĝo*, antaŭ ol ili estis ĝisfine irintaj la vojojn, kiuj solaj estus povintaj konduki ilin al la *lumo* ...

Sed mil *trompaj lumoj* insidis apud ilia vojo, kaj ĉiu el tiuj strebantoj subfalas al tiu lumo kiu povis plej bone trompi lin, kaj li sentis sin „*iluminita*“, dum li estis malleviĝinta en pli profundan nokton ol ĉiuj, kiuj ja estis senplane *serĉantaj*, ekkoninte la trompon kiel tian, sed ne povis trovi la *vojon* irendan. –

Sed kiu *timas* la vojojn, kiujn li unue devas ĝisfine iri, se li volas renkonti *min* kaj esti *iluminita* en *mia* lumo, *tiu vere* ne estas inda je *iluminiĝo* kaj *meritas*, ke li en teda nokto *palpas* la aferojn nur kiel sonĝanto, anstataŭ ke li *ekkonas* ilin en mi tiel, kiel oni povas ekkoni en mi *sola*: – *travidante* tion estantan, ĉar ĉio estanta povis *estiĝi* nur en *mi* kaj ĉar mi portas ĝian eston en mi kiel patrino la frukton de sia ventro! – – –

Kiu strebas al *iluminiĝo*, antaŭ ol li mem faris sin *inda* je ĝi, *meritas*, ke la *trompo* povas mistifiki lin, ĉar li konfuzas la *realon* kun sia *iluzio*, tiel ke estas prave, se *iluzio* prezentiĝas al li kiel realaĵo. – – –

Ho, kiom plena estas tiu ĉi tera mondo je homoj trompitaĵoj de ilia propra iluziado, kaj per kiom altaj baroj ili fermis al si ĉiujn vojojn, sur kiuj povus atingi ilin iu, kiu kapablus ankoraŭ eligi ilin el ilia iluziado!

Mi vere ne volas vidi vin inter tiuj trompitoj, tial mi konsilas al vi, kiun mi amas, ĉar mi havas en vi mian tabernaklon: – ne fuĝu for de la vojoj celantaj konduki vin al mi, eĉ se eble ili ofte ŝajnas al vi malmalumaj kaj senkonsolaj; ĉar jen mi egalas la sunon kaj radias plej hele *tiam*, kiam antaŭe malluma nubajo kaŝis min al la okulo de l' homo! – –

Ankaŭ al tiuj, kiuj tiel kaŝas sin en *mallumo*, mi samamaniere estas plej interna *lum* kaj havas en ili mian sanktan ujon, – sed ili vualas ĝin per densa vualo, kaj serĉas *ekstere* tion, kio povus atingi ilin nur en ilia *plejinterno* ...

Fierege ili kredas esti kapabla trovi la lumon, kiu povus lumini ilin, sen la helpantoj, kiujn mi kreis al mi el inter ilia mezo, por ke mia lumo ricevu la mildan formon, kiu povas ankoraŭ esti *eltenata* de la noktovualitaj homoj; alie la radioj de mia pli ol sunhela lumo tiom blindigus iliajn okulojn, ke ili devus por eterne perdi la kapablon vidi. – –

Neniu povas proksimiĝi al la suno, sed ĉiu povas ricevi ĝian lumon, kaj eĉ se milionoj iradas en ĝia lumo, *ĉiu* ricevos ĝian plenan lumon kaj neniu ricevos *pli*, se li *sola* estus prilumata.–

Sed la *radio* de la suno unue devas pasi tra diversaj tavoloj de la universa spaco, kaj fine en la *tera* atmosfero ĝi estas ŝanĝata tiamaniere, ke vi povas elteni ĝin.

Se vi povus proksimiĝi al tiu radio tie, kie ĝi eliĝas el la suno, vi certe devus samamomente pereji en ĝia fajro. –

Krome, ŝajnus al vi la personigo de malsaĝeco ĉiu homo, kiu kredus, ke la lumo de l' suno povus atingi lin, se inter li kaj la lumanta astro ekzistus neniam *substanco*, en kiu la ondoj de la lumo povas *propagiĝi*. –

Sed ion similan atendas ĉiuj, kiuj volas trovi min en si, sen antaŭe malfermi sin al la „cirkvito“, kiun mi kreis el iliaspecaj homoj, fariĝantaj kvazaŭ substanco por transformi la radiojn de mia lumo. – – –

Certe, vi portas min *en vi* kaj mi estas pli proksima al vi ol via propra korpo, – sed nur via *konscio* povas malkaŝi min al vi!

Sed via konscio estas tre diversmaniere *limigita* kaj neniam povus senti *min* en si, se mi ne estus kreinta al mi en kelkaj homoj, vivantaj sur la tero same kiel vi, *transformantan forton*, kiu nun fonte *elfluas* el ili kaj sekve povas atingi ĉiun homan konscion, kondiĉe ke ĝi moviĝas renkonte al tiu fortotfluo *per agado kaj vivo!* –

Jam multajn jarmilojn la konscio de l' tera homo tiamaniere ricevas sciiĝon pri mi, kaj dum vivas ho-

moj sur tiu ĉi tero, ĉiam estos inter ili kelkaj, kies spirita naturo servos al mi por krei tiun transformantan forton. — — —

Sed eĉ se en iu tempo estus inter la homoj nur *unu*, en kiu mi povus estigi tiun forton, tial, ke li en sia spirita naturo libervole sin prezentis por tio, antaŭ ol li ricevis la teran korpon, — tamen *ĉiu* homa konscio ricevus tiun transformantan forton el tiu *unu*, ĉar tio, kion mi tiel estigas en unu el tiuj homoj, *tute ne estas entenata en li sola, sed efikas per vibroj, kiuj disvastiĝas sur la tuta terglobo kaj samvibrigas ĉiun konscion, kiu sciante, aŭ sekvante kun fido nur sian sentadon, sopiras min per siaj tutaj animaj fortoj!* —

Tiuj, kiujn de post tempo nememorebla mi kreis al mi kiel *lumantojn*, preskaŭ ĉiam devis resti en soleco, neekkonite kaj fore de homa agado, kaj nur ekstreme malofte iu el ili ricevis la vokon, ke li faru sian agadon inter aliaj homoj.

Nur kiam la maturiĝo de la tempo postulis la semadon de nova semo, kiu ĝermu en mia lumo, mi elsendis tian vokon.

Sed la *transformanta forto*, kiun mi konstante estigas en tiuj lumantoj, estas io tute alia ol la *agado en la regiono de videbleco*, kiun mi de tempo al tempo ordonis al unu el ili. — —

Neniu alia ol unu el la lumantoj iam povus esti plenumanto de tiu agado! — — —

Kio estas donata al vi de unu el tiuj agantoj, tion rigardu kiel instruon, kiu povas gvidi vin *al la preparado de vi mem*; – sed kio donas al vi la kapablon trovi min en vi, tion vi ekkonu sole en tiu *transformanta forto*, kiun mi konstante estigadas en *ĉiu* el miaj lumantoj, – indiferente ĉu li agas en la vigla vivo de la ekstera mondo, aŭ ĉu, vivante en plej profunda soleco kaj neatingeble por iu homa alvoko, li devas nur direkti la forton, kiu, estigite de mi en lia spirita naturo, nun elfluas el lia spirita naturo kaj tiam povas atingi la sferon de konscio de ĉiuj homoj sur tiu ĉi tero! –

Ne provu heligi al vi per la malklara lumigilo de la intelekto tion, kio povas fariĝi vere hela kaj klara al vi nur tiam, kiam ĝi plenumiĝas en via propra *spertado*!

Sed sciu, ke multaj miloj min serĉis kaj min *ne* trovis, ĉar ili, revante en sia tera konscio, tro firme implikiĝis en la katenojn de ilia propra iluziado, ĝis la penso, ke ili povas *peti* luminiĝon, fariĝis fremda al ili, tiel ke ili ne plu kapablis *frapi* tie, kie al ĉiu, kiu scias frapi, estos *malfermate*!

Se vi serĉas *luminiĝon*, tiam *large malfermu vian koron* kaj kreu en vi la staton de iu, kiu *volas lasi doni* al si, kion li ankoraŭ ne posedas!

Estu kiel iu, kiu frapas je la pordo de trezoreja domo kaj scias, ke li havas la *rajton*, ke oni malfermu al li!

Sed ne provu kvazaŭ ŝtelisto malfermi la pordon *per falsaj ŝlosiloj*, nek kvazaŭ soldato *kur-atake rompi* ĝin!

En ambaŭ provoj vi ne sukcesos, kaj laciĝinte vi endormiĝus antaŭ la pordo, kaj tiam en trompaj sonĝoj kredus, ke vi estas eniĝinta. —

Ankaŭ gardu vin, ke vi ne volu *preni*, antaŭ ol oni *donas* al vi!

Vi neniam povus ekkapti tion, kion vi kredas vidi antaŭ vi, kaj ĉiu provo etendi vian manon al tio dezirata rezultus en tio, ke vi etendus ĝin en vakuon! — —

Sed se vi volas agi laŭ mia vorto, via vana serĉado tuj estos finiĝinta!

Plenumante la leĝon, kiu tie ĉi estas plenumenda, vi scios *trovi*!

Malfermante vian koron al la *graco*, kiu ne konas arbitrecon, vi atingos *iluminigon*, kiu iluminos vin *eterne*! — — — — —

SOLENA PROMESO

Ho Vi, *Neimagebla, Prapotenca*, kiu sendas la heligantajn stelojn de Via vorto en mian nokton de neekkonado, lasu mian dankon leviĝi antaŭ Vi kiel nuboj de incenso kaj pleniĝi la nemezureblecon de Via templo!

Vere, mi ne scias kiel *nomi* Vin, escepte se via „*Nomo*“ – sanktigita de Via *esto* – estas la sama, en kiu *mi mem* lernis nomi min, venante al mi mem kaj dirante:

Mi!

Vi *Pra-Mi, Pra-Lumo, Pra-Vorto* estas la *prafundo* de mia esto!

Vi mem instruis mian animon nomi min: *rebrilo* kaj *bildo* de Via „*Nomo*“! – –

Malheligite de ĉiuj intermuroj, kiujn mi mem konstruis kaj kiuj celis kaŝi min al Vi, Via lumo tamen fluis al mi!

Estante „*lucifero*“ – *portanto* de Via lumo –, mi iam estis proksima al vi, antaŭ ol mi mem lasis min malleviĝi en teruran mallumon, ĉar mi pensis, ke mi mem estas la

Lumo!

Nun Vi mem estigas en homoj miaspecaj, por liberigi min, la nekompreneble altan *transformantan forton* de Via amo, por ke povu naskiĝi en mi – elkreskinte el la virga sino de la animo – „*Kristo*“ la Sinjoro: Via

Vorto

por rekonduki min al Vi el infera turmento kaj el mal-lumo plej fora de lumo! – – – – –

Vi, la *pra-fundo* de mia ekzisto, sciigas al mi *Vin mem*, – instruas min, per homlingvaj vortoj, trovi *Vin*, kaj montras al mi, ke loĝas en vi la *graco*, kiu, estante alte super ĉia arbitro, estas *leĝo* kaj postulas plenumadon, se mia animo povu atingi ĝin ...

Ho, kiom malproksimaj de Vi estis tiuj, kiuj parolis al mi pri „graco“ tiel, kvazaŭ Vi povas, simile al ŝanĝiĝemaj teraj homoj, laŭkaprice pardoni aŭ ne pardoni mian kulpon! – –

Nun Vi mem venis al mi por instrui min, kaj mi ekkonas *Vin*, kvankam mia okulo estas ankoraŭ blindigita de la superhela klareco de Via lumo!

Nun mi scias, ke mi mem estas nur *bildo de Via vivo*, kaj ke ĉio, kion mi mem atribuis al mi, estis sole nur la efiko de *Via potenco!* — — —

Al *Vi*, mia plej interna *esto*, nun sin turnu mia animo!

Nur en *Vi* ĝi povas sekure ripozi!

Nur de *Vi* ĝi povas atendi la savon!

Nur el *Vi* povas veni al ĝi la liberigo!

Aĥ, ke mi ne pli frue ekkonis, kiel mi povas liberiĝi, kaj ke mi ĉiam esplorigarde serĉis venontajn savantojn, dum mi portis Vin, la savanton, *en mi mem!* —

Sed nun mi vere ne volas grumbli, kaj ne volas plendi pri mia sorto.

Hodiaŭ, en tiu ĉi tago, venis al mi la savo!

Eterne laŭdata estu la tago kaj horo, kiam *Vi*, mia plejinterno, volis turni Vin al mi!

Mi ne povus iam de *Vi* eskapi, eĉ se mi neniam min turnus al *Vi!*

Malleviĝinte en nokto, perdante min mem, mi tamen restus, eĉ nesciante, la rebrilo de l' miraklo de ĉiuj mirakloj, kiu eterne estas *Vi mem!* — — —

Sed nun kiam *Vi* mem vokis min, mi vere ne volas ignori la vokon!

Aĥ, dum multaj jaroj mi kun arda sopiro atendis Vian vokon!

Ho Vi, kiu portas mian animon en si mem, gvidu min ekde nun per tiu *transformanta forto*, kiun vi estigas en spiritaj homoj, por ke mi ekkonante akiru la vidadon, same kiel tiuj, kiujn por mia savo Vi kreis al Vi kiel helpantojn!

Jen mi estas Via propraĵo, kaj estas nenio je mi, kio povus havi iun rajton pri mi!

Mi apartenas nur al *Vi* kaj havas plu nenion, kio ne volus esti *ekprenata* de *Vi*!

En *Vi* sola mi volas trovi mian savon kaj mian beatecon!

Al *Vi* sola mia tuta spirado ekde nun estu jubilanta laŭdo!

Al *Vi* sola sin turnu mia tuta pensado!

Per *Vi* sola mi volas iam esti eterne en la *vivo!* – –

**Vi, –
la:
„Mi Estas!“**

Tradukoj de pliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:
<http://www.a-rehfeldt.de>